**EKO**

**Esperiga Komuniko**

**Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado**

## Enhavo


- Duolingo al plia grava lingvo!
- MENSA – ĉu plia revevigo?
- Retkursoj, la azia revivigo?


Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-40 sendita el Budapeŝto, la 1an de aŭgusto*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Duolingo atingas novan multmilionan publikon!

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe Novaĵoj. Jen estas kelkaj informoj pri ĝi:
-----
Titolo: Duolingo nun ankaŭ por franclingvanoj
Novaĵo transprenita el Libera Folio:

Ĵus estis lanĉita franclingva kurso pri Esperanto en la populara lingvolerna retejo Duolingo. Jam pli ol 2 400 personoj aliĝis al la kurso. Sume en la kvar diverslingvaj kursoj de Duolingo nun estas proksimume 730 000 aktivaj lernantoj de Esperanto."

Duolingo estas senpere atingebla klakante al https://www.duolingo.com

Legu pli ĉe la paĝo: https://edukado.net/novajhoj?id=830

Atendas vian viziton la redaktoro de edukado.net

Ĉi tiu grava novaĵo valoras ne nur por la franca kaj francparola movado, kiu ja urĝe bezonas renovigon – ĝi eĉ pli valoras por la signifa kvanto de afrikanoj, kiuj havas la francan inter sia abunda lingva arsenalo. Por ili, precipe en la nunaj pandemiaj tempoj, gravas la milionoj da atingeblaj homoj. La Afrika Komisiono kaj la landaj asocioj en la okcidenta afriko devas ege eklabori laŭ ĉi tiu mirinda ebleco.

# MENSA sojle de renaskiĝo

Mi estas dumviva membro de UEA kaj nun mi ekestas nova membro en Mensa. Pro tio mi decidis relanĉi la fakan asocion "Espermenso" kiu kunigu membrojn kaj de UEA kaj de Mensa. Por komenci mi kreis pli larĝan Fejsbukan grupon "Espermenso". Ĝi akceptas ankaŭ eks-membrojn aŭ estontajn membrojn de la du organizaĵoj. Kaj mi ĝojas konstati ke tio revigligas la lernadon de Esperanto ĉe pluraj Mensa-anoj.

https://www.facebook.com/groups/743585999792126

Bonvolu diskonigi al viaj geamikoj membroj de UEA kaj de Mensa, dankon.

# Lingokursoj tra la varbenda Azio

Estis kreita la Irana Kursaro 'Tibor Sekelj', kiu metas sian Zoom-konton je dispono de ĉiuj, kiuj volas instrui Esperanton en siaj lingvoj. Post unua sukcesa provo pri kurso de Esperanto en la taja sekvis aliaj kursoj, kiuj estas registritaj kaj rigardeblaj ankaŭ poste en https://www.espero.ir/eo/kursaro/ . Se vi rigardas nun estas kursoj en la suahila, la araba kaj la kurda. Sekvis kursoj en la vjetnama, en la urdua kaj en la indonezia. Se vi volas realigi kurson pri Esperanto en via lingvo, skribu al <kursaro.sekelj@gmail.com>.

Okaze de la virtuala tago de MONA kaj la prezidanto de UEA, Duncan Charters, kaj la vicprezidanto, Fernando Maja, esprimis sin favore al tiu agado kaj promesis kunlaboron de UEA. Cetere tiu agado kongruas ankaŭ kun la agado de ILEI, kies subtenon la kursaro nun publike petas.

## Indonezio

Nova baza kurso pri Esperanto en la indonezia lingvo komenciĝis la 18-an de julio. Gvidas la kurson Ilia Dewi per la programo Zoom de la Irana Kursaro 'Tibor Sekelj'.

Pliaj informoj ĉe : asosiasiesperanto.iea@gmail.com kaj kursaro.sekelj@gmail.com

## Vjetnamio

Nova senpaga kurso pri Esperanto en la vjetnama per la Zoom-sistemo de iranaj esperantistoj: instruas s-ino Julianna (el Hungarujo) kaj s-ro Hoang Ngoc Boi (Vjetnamio). Organizanto de la kurso: S-ino Tran Hoan.

======= Vortoj: 455 ======

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.